


# BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE  
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



No 17.

Septembro - Oktobro 1954

Aperas laŭbezone

## TIUJ PLEJ EMINENTAJ

Al Dro Pumpr por lia perfekta traduko de  
La Bapto de Caro Vladimír de  
K.H.Borovský.

Tiuj plej eminentaj  
antaŭen sin ne puŝas,  
sur ili ĉiam kuŝas  
taskoj temprabaj, gravaj.  
Ho, tiuj vere bravaj,  
ho, brava vi!

Tiuj plej eminentaj  
silentas pri l'diplomoj,  
ja ili kiel homoj  
al ni jam iĝis karaj.  
Ho, tiuj vere raraj,  
ho, rara vi!

Tiuj plej eminentaj  
neniam false pozas,  
sed sian sulkon fosas  
por ni kaj eksterlandaj.  
Ho, tiuj vere grandaj,  
ho, granda Vi!

Eli Urbanová

Esperantista Klubo en Praha estas fiera, ke ĉi tiuj eminentaj getalentuloj  
apartenas al ĝia aktiva anaro!

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY (25.7.-7.8.1954) denove estiĝis plensukcesa  
aranĝo, kiu altiris ĉeeston de 89 partoprenantoj el ĉiuj anguloj de la respubliko.  
Antaŭaj informoj en nia Bulteno kaj ĝia aldono Verda Voĉo kaj en belaspektaj  
varbiloj donis al interesuloj eblecon elekti la kurson laŭ ĉies propraj scioj.  
Instruhoroj nunjare estis de la 8a ĝis la 11a. Dum la posttagmezoj kolektiĝis la  
kolegianoj ĉe la Lago de Mácha, kie regis ĉiam tre vigla esperantista vivo.  
Speciale interesaj estis libernature aranĝataj prelegoj kaj diskutoj pri variaj  
temoj. Ĉiuvesperaj programoj, plej ofte vere altnivelaj, kontentigis plene eĉ la  
plej postulemajn anojn de la kolegio.

Neforgeseblaj estis la artaj vesperoj de nia samideanino Eva Suchardová, kiu  
meritas prezenti sian arton al internacia publiko. Tre instrua estis la prelego de  
s-ano Rudolf Burda, kiu klarigis kiel servigi Esperanton al la pacdefendanta

LA 39A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO  
EN HAARLEM estis unu el la plej sukcesaj  
kongresoj esperantistaj. Kvankam neniu  
ĉeĥoslovaka esperantisto ĉeestis ĝin,  
tamen la kongreso multe parolis pri  
Esperanto en nia ŝtato:

ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ VENKIS en  
Haarlem en nunjara INTERNACIA BELARTA  
KONKURSO de Universala Esperanto-Asocio.  
Kun granda ĝojo ni transdonas ĉi tiun  
sciigon al nia legantaro. Sesfoje oni  
rekonis altajn kvalitojn de la verkaro de  
ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

Nia poetino Eli Urbanová ricevis la unuan  
premion en la fako de originala poezio  
por sia poemo "Antaŭ la spegulo",  
profesoro Štěpán Urban per siaj noveloj  
"La lasta tago" kaj "Idilia golfo" okupis  
kvaran kaj kvinan lokojn en la branĉo de  
originala prozo.

Granda surprizo estis la venko de  
redaktoro Antonín Seemann, kiu konkeris  
la unuan, duan kaj la trian premiojn en  
drama fako per siaj teatraĵoj:  
"Korespondu", "La spirito mokas" kaj "Mi  
esperas".

movado, kiel aranĝi kursojn, kiel fondadi grupojn ĉe uzinaj kluboj aŭ klerigaj asocioj, kiel defendi Esperanton kontraŭ malpravaj atakoj el vidpunktoj ĝenerala kaj marksisma.

Nunjare venis kun iuj gepatroj ankaŭ la etaj infanoj, kiuj tre ofte vere pacience partoprenis la instruadon. Tial la estraro planas por la venontjaro aranĝi por tiaj infanoj kolegian infanvartejon kun faka esperantista gvidantino.

Emocio kaptis ĉiujn, kiam venis la momentoj de adiaŭo. La espero, ke denove venontjare ni revenos en Doksy fortigas nin dum nia ĉiutaga laboro. Koran dankon al la direktoro Dro A.Pitlík kaj al la tuta kolegia estraro!

- -

-jelĉ-

IIIa SOMERA ESPERANTISTA TENDARO estis aranĝita 5.7.-14.8. de la Esperanto-fako de Kleriga Domo "Petr Bezruč" en Opava sur florplena herbejo, flankata de rivero Moravice en profundaj arbaroj 6 km sude de la plej proksima vilaĝo (kaj proviant-bazo) Žimrovce. Fervojobato 50%. Partoprenis 65 personoj en tri kursoj 14 tagaj: I. elementa 22 (infanoj 6-15-jaraj), II. perfektiga kun historio kaj literaturo, ekzamenoj kaj studatestoj (28 gejunuloj), III. por grupgvidantoj (15). Ĉ. 20 aliĝintojn por la II-a oni rifuzis pro manko de loko. Instruis kaj prelegis Novobilský (I-II), Matušková (I), Škvrna (II), Mařík (II-III), Echtner, D.Kočvara kaj Čermák (III). Oni loĝis agrable en 14 tendodomoj sufiĉe komfortaj kun improvizitaj litoj (eĉ malgranda biblioteko kaj florvazoj ne mankis).

Kelkaj eroj de la tagprogramo: veksinalo je 6-a, korpekzerco, hiso de ŝtata flago, lecionoj; ptm. ludoj, baniĝo, studo; antaŭvespere leciono; vespere ĉirkaŭfajra kunsido, unufoje en semajno granda solena tendara fajro kun neesp. gastoj. La lecionojn kompletigis i.a. ankaŭ radioprelegoj (Lapenna, Privat). La nivelo kaj rezultoj de la studtendaro estis bonaj, iuj tre kontentigaj. Ekz. en la IIIa oni parolis, ankaŭ private, preskaŭ nur en Espo, de leviĝo ĝis ekdormo. S.Echtner en sia resuma fina parolado diris, ke tia junularo, kian li instruis ĉi tie, povas rezultigi renesancon en la movado. - Publikan dankon pro grandaj penadoj organizaĵmeritas junaj samideanoj el Opava, precipe J.Solnický, la tendarestro, junulo ĉarme gaja, sed aliflanke severa gardanto de la tendara disciplino, J.Kuzník, V.Kočvara kaj ankaŭ V.Novobilský, respondeculo pri instruado en I-a kaj II-a partoj.

La tendaro estis travivaĵo nekutima. La samideana vivo en la sino de l'naturo ege plaĉis al ĉiuj, ankaŭ al la subskribinto, kiu reveninte al Praha eksentis fortan sopiron tuj reiri al SET. - La bedaŭrinda manko de loko ne permesas pli fundan valortakson de SET. Eble venontfoje!

- -

J.Mařík

ESPERANTA KURSARO kaj regiona kunveno en PŘÍBOR okazis de la 18a - 31a de julio 1954. La aranĝon ĉeestis entute 40 personoj enkalkule kelkajn infanojn. Kurson por la komencantoj lerte gvidis sperta aktivulo Vl. Slaný el Ostrava. En supera kurso prelegis kelkaj samideanoj. Speciale oni laŭdis interesan paroladon de s-o Staňura, kiu prelegis pri la historio de stenografio. Lokaj samideanoj kun senlaca kaj oferema instruisto Ant. Satttek tre diligente zorgis pri ĉiaspeca bonfarto, bonhumoro kaj distro de la partoprenintoj. Belaj ekskursoj al ĉirkaŭaj vidindaĵoj, artvesperoj, ekz. tiuj, aranĝitaj de prof. Frant. Marušan kaj de lia edzino alproksimigis al la aŭskultantaro muzikan arton de Leoš Janáček kaj malnovajn popolkantojn de la regiono. Instruisto Fr. Kutáč estis ne nur gvidanto al proksima Štramberk, sed ankaŭ elokventa rakontanto de ĝia historio. - Urbo Příbor mem enhavis por la ĉeestantaro kelkajn agrablajn surprizojn. Ekz. la stacidoma tabulo kun verda stelo - aŭ granda bedo en formo de verda stelo sur blanka fono - plantita el kreskaĵoj de tiuj koloroj en parko situanta ne malproksime al la stacidomo. JEĎTE OPATRŇĚ - VETURU ATENTE estas dulingva atentigo por la ŝoforoj antaŭ danĝera krucvojo. - Belaj estis la tagoj en Příbor, bonaj homoj estas tie kaj bona estas ilia laboro!

- -

Š.Š.

Grupo de junaj slovakaj esperantistoj tendumis sub gvido de Milan Zvara, en julio, sub la monto Králova Hoľa - detalaj informoj ne atingis nin.

- -

LANDA LABOR KONFERENCO JUNULARA de uzinaj Esp.-rondetoj okazis 31.7.-1.8. en la bela kastelo de Hradec u Opavy. Partoprenis preskaŭ 100 personoj, inter ili kursanoj de Somera Esperantista Tendaro. Okazis raportoj pri agado, elekto de regionaj delegitoj kaj ĉefdelegito (J.Kuzník), diskutoj pri manieroj de laboro, pri kunlaboro al movado de pacdefendantoj kaj MEM.

- -

Závodní klub ROH n.p. Svit v Otrokovicích - kroužek esperantistů pořádá ve dnech 11.-12. září 1954 s j e z d e s p e r a n t i s t ů. Program dne 11.9.: literární večer a přátelská zábava s tancem. V neděli 12.9.: projev zástupce ZK ROH n.p. Svit Otrokovice, E s p e r a n t o v b o j i z a m í r. Jak prohlubovat své znalosti esperanta, diskuse.

Bedaŭrinde nia klubo ne ricevis precizajn informojn, nek invitilojn; tamen la klubon reprezentos delegitoj: Ant. Slanina, Dolfa kaj Inge Bartošikovi.

- -

A Ŭ T U N O

Folioj kuŝas sur la vojo,  
folioj dudekkvin kaj cent;  
kaj ĉiu - unu vana ĝojo  
kaj unu forsveninta sent'.

Kaj tial ĉi mi tiom amas  
la sonĝsezonon de aŭtun',  
ĉar dum ĝi sur la tero flamas  
milopa ruĝ', purpur' kaj brun'.

Karolo Piĉ  
(El poemaro "Jarsezonoj")

JULIE ŠUPICHOVÁ grave malsanas en sia hejmo, Praha II - Malá Štěpánská 6. Longe daŭranta malsano de nia membrino-pionirino Julie Šupichová malebligas al ŝi ĉian aktivecon. En lasta tempo ŝi ne nur tre malfacile kapablas moviĝi, sed eĉ korespondi kaj verkadi ŝi ne povas. Kompreneble ke ŝi ne povas respondadi ian ajn korespondaĵon, plenumi servojn aŭ eĉ mendojn! Bonvolu do eviti tiaspecajn rilatojn al ŝi. Ŝia nobla koro sentas des pli grandan doloron, ĉar ŝi ne povas respondadi. - Ni sincere deziras al nia verkistino kaj instruistino Julie Šupichová baldaŭan resaniĝon kaj plenan refortiĝon.

Esp. klubo en Praha

- -

DU PLIAJ SEPDEKJARULOJ INTER NI

Neatentite pasis dum nuna printempo la bela jubileo de 70-jara aĝo ĉe du niaj pioniroj, s-oj H.K.Bouška kaj Eduard Kühnl. La 2an de marto atingis tiun aĝon nia amiko H.K.Bouška, vivanta ĉiam en Praha-Vršovice, sed je nia sincera bedaŭro tro malofte aperanta inter ni. Ni tre dezirus ĉerpi el lia multjara sperto propaganda kaj el la profundaj lingvaj scioj de tiu ĉi nia pioniro, kiu estas prave konsiderata unu el la fondintoj de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado.

Eduard Kühnl iĝis 70-jara la 16an de majo. Ni kun danko kaj estimo rememoras lian laboron inter ĉeĥaj esperantistoj. Al ĝi li dediĉis plurajn jardekojn de sia vivo. S-o Kühnl vivas nun en Suda Ameriko, eble en Ĉilio kaj tien sin direktas niaj pensoj. Ambaŭ jubileintoj akceptu nian sinceran gratulon!

- -

NIAJ MORTINTOJ. Kun granda doloro en la koro ni informas pri forpaso de tiuj ĉi fervoraj esperantistoj: Pro malfeliĉa akcidento pereis la 12an de junio nia amiko Rudolf ZANÁŠKA el Kopřivnice, atinginte 47 jarojn. Estis unu el la tre aktivaj samideanoj en tiu regiono kaj ni perdas en li malfacile anstataŭeblan batalanton por nia ideo. Li iniciatis fondon de Esperanto-muzeo en Kopřivnice, lastatempe li zorgis pri eldono de "La Pacdefendanto".

Alois KUBALA en Ostrava mortis la 11an de jullio 1954. Kvardek ok jarojn li aktivis en la regiono Ostrava. La kluboj de li fonditaj ekzistas kaj vivas, la monumento dediĉita al Komenský kaj al Zamenhof, kiun Kubala inaŭguris, staras en la Parko de Ostrava-Zábřeh. Amaso da poresperanta laboro dum longaj jaroj konstante plibonigata donis bonan fundamenton al nia movado en la regiono de Ostrava. Ĝi ja estas el la ĉeĥoslovakaj inter la plej bonaj. - La kremacio de A.Kubala okazis la 13an de julio 1954. Super lia sarko paroladis samideanoj Lička ĉeĥe, Slaný esperante. Ĉeĥan poemon prezentis aŭtoro A.Chrápavý. S-ino Gartnarová recitis poemon, kiun la mortinto verkis por sia propra kremacio. Eĉ pri tio la mortinto pensis, ke post lia forpaso ne daŭru malĝojo kaj aflikto. La poemato estis vera adifo por liaj familianoj kaj por la esperanta familio.

Foriris fakte veraj, verdaj fervoruloj!

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Junularo kunvenas samloke kaj samtage je la 19a horo.

Venontaj programoj:

- 15. 9. Jaroslav Šustr: Laboro de ĉeĥa virino, kiu transvivis jarmilon!
- 22. 9. Inge Bartošíková: Rimarkoj pri UK kaj pri la kunveno en Otrokovice.
- 29. 9. Oto Ginz: Postmilita kresko de nia literaturo.
- 5.10. Eva Suchardová: Večer soudniček Fr. Němce (ĉeĥe).
- 12.10. Jan Zemek: Bramana letero (pro granda intereso ripetata prelego).
- 19.10. Inĝ. Jaroslav Růžička: El historio de matematiko (ĉeĥe)
- 26.10. Jaroslav Mařík: Mor Jókai - 50 jaroj de lia morto.
- 3.11. Eva Suchardová kun sia artkolektivo: Vespero de la premiitaj konkursaĵoj.

UPOZORŬUJEME A VŘELE DOPORUĈUJEME VĀM I VĀřIM HOSTŬM:

Ve ĉtvrtek 16 zĀřĭ 1954 ve 20 hodin

VelkĀ sĀl - Smeĉky

V ĚĈNĀ EVA

v podĀnĭ Evy S u c h a r d o v ě a jejiĥo uměleckĥo kolektivu.

!!

KIE VI POVAS LEGI HEROLDON? (Vidu ankaŭ Bultenon 15 kaj 16!) NovĀ Bor: Stan. Mayer, Koněvova 292; Pardubice: Karel Franc, Okrouhlĭk 811; Perřtejn n.O.: Jan Kafka, nro 15; Pĭsek: Libor KřivĀnek, ZborovskĀ 1332, Jiřĭ PlachĀ, Źiřkova 18; Plzeň: Rudolf Burda, Palackĥo n.6, Reiser Josef, sprĀva spojŭ; Přibyslav: prof. Jan Filip; Rokycany: Vladimĭr Koĉvara, nĀm. 82; Rychnov n.Kn.: S.SuchomelovĀ, Stalinova 938; Skalice u Ĉeskě Lĭpy: Richard Wenzel nr 187; Strakonice: Jan Blařek, Stalinova 198; Tanvald-řumburk: Evřen Belda, nro 461; Trutnov: Emil SedlĀĉek, nĀm. hraniĉĀřŭ 10; Třebechovice p.Or.: K.Faltejsek, nĀkl. pokl. ĈSD; Ŭpice: Jan řĭr, Vanĉurova 638; Ŭstĭ n.Lab.: Oldřich DruneĉkĀ, Fuĉĭkova 205; Velkě Hamry: Zdeněk ŘezĀĉ, SvĀrov-SEBA; ŹďĀr n.SĀz.: Fr.SuchĀ, nro 431.

TUJ LIVEREBLA:

La prezoj kun afranko:

ESPERANTO V KOSTCE (řupichovĀ) lernolibro kaj manlibro (ciklostil.)	5,60
GRANDA ĈEĥA-ESPERANTA VORTARO de Fr. Filip, 656 paĝoj - bindita	53,-
HOVOŘĭME ESPERANTSKY (řupichovĀ)	4,80
KANTARETO de fratoj Filip (61 kantoj kun la muziknotoj)	10,40
URBO EN LA SIGNO DE FAJRO (M.MajjerovĀ)	6,40
ĈESKO-ESPERANTSKĀ SLOVNĭĈEK (R.Hromada)	2,20
UNUA LIBERA KONGRESO (pri la 28a bulgara E-kongreso 1945)	1,20
SEPTEMBRO (Geo Milev)	2,-
ESPERANTISTA 1951 - la lasta jarkolekto: ENESTAS ESPERANTO-ĈEĥA kaj ĈEĥA-ESPERANTO VORTARETOJ kaj MALGRANDA KORESPONDANTO	12,-
ESPERANTISTA 1950 (kelkaj ne multaj jarkolektoj)	6,-
TRIKOLORAJ ESP. GLUMARKOJ de D. Bartořĭk	2,50
POřTKARTOJ KUN LA PORTRETO DE ZAMENHOF (Bartořĭk) 10 ekz	2,50
O ZKOUřKĀĈH Z ESPERANTA (Dr. St. KamarĀt - Dr. T. Pumpr)	2,50
ESP. INSIGNO (verda stelo sur blanka fono)	3,-

Mendu ĉe Jaroslav řUSTR, Praha I, DlouhĀ 10, kiu sendos al vi pagilon por antaŭa pago. Ni ne povas liveri antaŭe kaj ankaŭ NE reimburse. NE POSTULU ESCEPTOJN, ne komplikuj nian absolute senprofitan laboron. Se vi urĝe ion bezonas, sendu la monon kun la mendo!

Proksima numero aperos komence de novembro. Eldonkvanto: 1000 ekzempleroj.  
Koresponda adreso: Jaroslav ř u s t r , DlouhĀ 10, Praha I.